



# Feliĉan jaron 2020!



# ĜENERALA ASEMBLEO DE ESPERANTO-GIRONDE. DIMANĈON la 5an de OKTOBRO 2019 je la 10a 30 en PESSAC

**C**eastas: Annie Brilleaud, Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, Hélène Forget, Joël Lajus, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Bernard Sarlandie, Rose Sarlandie, Bernard Vidal.

Senkulpigitaj: Karima Choukairi, Monique Dussenty, Gloria Gargallo, Ge-Jagueneau, Peio Labbé, Lucienne Laroche, Morine Stride.

**Elvezio** dankas al Jean-Seb pro la gastigado.

## **1. Agad-raporto (fare de la sekretariino kaj aliaj)**

Depost la lasta ĝenerala asembleo en Créon, la 14an de oktobro 2018:

### 1/ Kunvenoj

Okazis 5:

13/12/2018: Zamenhof-Tago en Cenon

06/01/2019: Reĝ-Festo en Cenon

03/02: en Pessac

21/03: Printempo de l'poetoj en Cenon

12/05: en Castelnau-sur Gupie, ĉe Monique

### 2/ LEGI

3 numeroj: 157, 158, 159.

### 3/ Aliaj okazaĵoj

- La kursoj daŭris en la Universitato.



- En Créon: Morine starigis oficialan TAP-Kurson en la elementa lernejo, kaj malfermis vesperan kurson por la plenkreskuloj.

- Partopreno de E-G en la librofesto en la universitato.

- Partopreno en la kafej-klaĉo en Pessac de Elvezio kaj Jean-Seb.

- La vendo de la KDoj de Brel ĉe Vinilkosmo

aperigis profiton je 70€, kiun FaMo, Pjer kaj Bernardo donacis al EG.

Elvezio kaj Karima vizitis SemEo-n en Tuluzo, kie ili renkontis Klementon (Semaine de l'Espéranto).

- La 12an de majo, ni festis la 80an datrevenon de Monique en ŝia nova hejmo.

- Marcelo kaj Klodin' partoprenis en la 92a SAT-Amikara kongreso en Barcelono. Aurora partoprenis en la UK de Lahti kaj trapasis la C1-ekzamenon. Ŝi sukcesis en la skriba parto, sed ne en la parola parto.
- Françoise Guilhaumé redonis la stokon da KDoj + 10 € (vendiĝis unu en Barcelono).
- Elvezio gastigis Esperantiston dum unu semajno (izraela profesoro pri la jida en Ratisbono). Ili vizitis Bordozone kaj la Valon de Aran'.



- Pasintan semajnon, Klodin' kaj Marcelo gastigis Claude Rouget, kiu biciklas de Norvegio al Lisbono. Li estas profesoro pri historio. Ili interkonatiĝis kaj kunagadis en la jaroj 80aj.
- Espéranto-Gironde eldonis sian broŝureton pri Don Kihoto. La tradukon de *La Morto de Sanĉo* (de Jean de La Ville de Mirmont) faris la cenona grupo. En la kongressako de la barcelona kongreso de SAT kuŝis la broŝuro, kiu kompilas tri tekstojn: epizodo de *Don Kihoto en Barcelono*, tradukita de Fred Pujulà y Vallès; *La Morto de Sanĉo*; *La strebo*, el la spektaklo *La viro el la Manĉo* (kun Jacques Brel). Dum la kongreso, Marcelo prezentis la broŝuron kun fotoj.

- Marcelo daŭrigis la floralbumon, kiu atingis 300 florslipojn. La afero pli kaj pli ampleksiĝas, kaj Isabelle Jacob (botanikistino el Limoges) ŝatus, ke eldoniĝu papealbumo. Marie-Hélène, el Châteauroux, ŝatus, ke estiĝu retaliro al la albumo. Ni montris la florslipojn en Germanio, Hispanio. Oni povus aldoni indokson por la latinaj kaj la franclingvaj nomoj, por eviti, ke la francaj nomoj aperu sur la slipoj mem.

La agadraporto estas unuanime aprobita.

## 2. Financa bilanco (fare de la kasisitino)

Compte courant: 1855,52 € à l'ouverture du compte et 2057,23€ au 5 octobre.

Livret A: 3001,87 €

Caisse courante: 42€

Parts Sociales Crédit Agricole: 30€

### Crédit :

- adhésions ; livres vendus ; CD ; ris-tourne SAT-Amikaro ; calendriers ; don. Pour l'instant, pas de calendriers 2020.



### Débit :

- assurance ; impression et expédition de LEGI papier (19 exemplaires expédiés = 261,74€ (3,27€ par exemplaire) ; affiche de l'hymne plastifiée ; fleurs pour l'anniversaire de Monique ; galette pour la reĝfesto.

Pour les revues LaKancerKliniko et LaSago, il n'est pas utile d'y abonner l'association. Un membre de l'association abonné peut donner son exemplaire pour l'archiver.

Cotisations : pas de changement (17€ pour une cotisation individuelle et 23€ pour une cotisation de couple).

Le stock de livres n'a pas beaucoup évolué : peu de livres vendus, aucun acheté. Peu de CD ont été vendus. Il en reste beaucoup.

Yannick propose de faire la promotion du CD auprès de collectionneurs amateurs de Brel : Facebook, forum d'amis de Brel... Il est décidé que le prix proposé sera de 12€, port compris. Il est possible de faire un lien vers Vinilkosmo, où on a accès à des extraits.

Elvezio : Facture concernant le site : apparemment, c'est un renouvellement automatique. Janine doit faire suivre le courriel à Martine.

Le rapport financier est approuvé à l'unanimité.

### **3. Atingoj kaj projektoj**

- Turneoj proponitaj de Yves Nicolas:

Claude Rouget, el Norvegio; Suzanne Roy, el Kebekio.

Aprobita estas la propono pri Claude Rouget (en novembro-decembro).

Joël estas interesata pri Suzanne Roy. En januaro la filmo *Esperanto* estos projekciita en la liburna kinejo, kun la asocio Kinoklubo kaj la loka grupo de nacia asocio Amikoj de *Le monde Diplomatique*.

La celo estos konatigi la gazeton, kunveni por debati pri la monata temo, kiu estos Esperanto (temo proponita de Jean-Claude Bot). Tiu evento okazos iun ĵaudon vespere en januaro. Ni devas trovi taŭgan titolon por la evento.

- Pri la blogo

Bernard V: Il faut envoyer de quoi alimenter le blog ; y penser pour les événements. Penser à des photos.

Pour LEGI, on y met les numéros au fur et à mesure jusqu'à l'avant-dernier.



- Pri la skanado de la numeroj de LEGI

Marcelo en Barcelono renkontis Ana Manero kaj Ivan Garcia. Ŝi estas bibliotekistino en la Nacia Hispana Biblioteko kaj starigas Esperanto-fakon. Do ŝi kolektas kiel eble plej multnombrajn Esperanto-dokumentojn. Ŝi rilatas kun la viena biblioteko. Ŝi bezonas tute pretajn elektronikajn dokumentojn. Por havi la plej trafikajn dokumentojn, necesas OCR-skanado.

Ivan, informadikisto, zorgas pri la traktado, ordigo de la dokumentoj, kaj ilin metas en la «nubon».

Marcelo komencis skani (per profesia skanilo) la SAT-broŝurojn, eldonitajn de Kribo kaj ilin sendas al Ivan. Kiam li iros Parizen, li prenos la broŝurojn, kiuj kuŝas en la sidejo por ilin skani kaj retsendi. Li jam prenis el la ŝranko la paperajn numerojn de LEGI antaŭ la numero 30; ilin li kopios; tio postulos multan tempon; poste li ilin disponigos al Ivan, por ke li traktu ilin. Tiel LEGI estos registrita en la Nacia Hispana Biblioteko!

- Kursoj

- En la Universitato, Elvezio kaj Jean-Seb: 8 studentoj. La kursoj okazas marde, en la sama salono.

Jean-Seb: Ni komencis instrui per *Gerda malaperis*, post unu duonhora prezentado de gramatiko per la afiŝo.

- En Galgono: Joël: ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a. Estas 5 partoprenantoj.

- En Gujan-Mestras: Bernard V: ĉiun vendredon; estas 3 partoprenantoj.

- En Montendre: Janine: ĉiun mardon; estas 3 partoprenantoj.

- En Cenon: ĉiun lundon; estas 5 partoprenantoj; Monique perrete partoprenos.

Bernard S: Ĝis nun estas neniu kurso en liceo.

Joël esperas montri la filmon *Esperanto* al liceanoj en januaro.

#### **4. Renovigo de la komitato**

Composition du conseil d'administration depuis l'assemblée générale du 14 octobre 2018: Jean-Sébastien Brilleaud, Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Monique Dussenty, Martine Edelbloude.

Tous les membres du conseil d'administration sont candidats à leur réélection.

Tous les candidats sont élus à l'unanimité.

Composition du conseil d'administration:

- Jean-Sébastien Brilleaud

- Elvezio Canonica

- Janine Dumoulin

- Monique Dussenty

- Martine Edelbloude

## 5. Diversaĵoj

- Elvezio: Agado al CNED: Neniu respondo ĝis nun, post la letero sendita de Elvezio kaj Guy Camy.

- Jean-Seb: Aurora proponis organizi vespermanĝon kun amikoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto.

- Marcelo antaŭ kelkaj tagoj rete ricevis bildkarton adresitan al Leo Robert, al lia antaŭa adreso. Transsendis ĝin la nuna loĝantino, kiu ricevis la karton en septembro. La korespondantino petas novaĵojn de Leo. Marcelo respondos al ŝi.

- Elvezio konsilas libron: *La domination de l'anglais, un défi pour l'Europe*; Robert Philipson, eld. Libre et Solidaire.

- Jean-Seb: La libro estis tradukita de Elisabeth Barbay, kiu prelegos en Bordojo.

- Joël: En Galgono, ni povus akcepti la grupon por la Zamenhof-Tago, la 15an de decembro. Marcelo prezentos la broŝuron (inter 20 kaj 25 minutoj).

- Kiun metodon ni uzas por instrui?

Janine: 1/ Metodo 10 + persona kurso laŭ la malnova *Cours rationnel*. 2/ Metodo 11 + Gerda malaperis

Joël: 1/ Junulkurso. 2/ Esperanto-infos

Klodin': propra metodo. Sed nuntempe ne estas komencantoj.

Bernard V: ni ne uzas metodon, ni ludas.

- Jean-Seb: Aurora bezonas la telefonnumeron de Gisèle Gizard. Joël provos trovi ĝin.

Venonta kunveno: eble kiam venos Claude Rouget.

## Élection du bureau

Le conseil d'administration se réunit à 13h20.

Sont élus à l'unanimité :

Président : Elvezio Canonica ; Trésorière : Martine Edelbloude ; Secrétaire : Janine Dumoulin

La asembleo estas fermita je la 13a 30.

Post la manĝo, multaj iras por promeni en la arbaro de Pessac ĉe la Fontoj de la Peugue.



Tra la arbaro de Pessac

Janine



# ESPÉRANTO-GIRONDE

## DIMANĈON, LA 1an de DECEMBRO 2019

### EN LA KULTUR-CENTRO PALMER DE CENON

**C**eestas Claude Rouget el Tromso (Norvegio), Elvezio, Karima, Ĵanseb, Annie, Marie, Hélène: sesopo el la Pesaka grupo, Carinne kaj Joël, el Galgona grupo, Marie-Rose kaj Bernardo el Le Haillan, Martine, Claudine, Marcelo el la Cenona. Senkulpiĝis Janine, Yannick, Gloria



Je la 11:00 Elvezio bonvenigas ĉiujn kaj ĝojas akcepti Claude, kiu ĉifoje ne venis bicikle. Post alveno en Portugalio, la biciklo estis forsendita al Norvegio. Nun li daŭrigos sian vojaĝon jen trajne, jen buse, jen ŝipe sed ne aviadile pro ekologia konvinko. Pluraj temoj estas proponitaj de li por diskuti:

- 1 - Iu Franco en Norvegio
  - 2 - Pri Norvegio: historio kaj socio
  - 3 - Norvegio, ĉu virta lando?
  - 3 - Mia vojaĝo
- + diskuto laŭ via intereso je via dispono.

Estis komune decidite alpaŝi plurajn temojn laŭ la demandoj de la ĉeestantoj. Pro riĉaj intersanĝoj la diskutoj komenciĝis matene, pludaŭris dum la manĝo kaj ankaŭ posttagmeze. Ĉiam en simpatia etoso kaj kamaradece.

#### **Iu Franco en Norvegio**

Esperanto-Gironde (EG): Ĉu Claude, kiu loĝas de pli ol 30 jaroj en Norvegio, estas Franco aŭ Norvego? Li diras ne plu havi francan pasporton. Kial?

Claude Rouget (CR): Pro politika konvinko. Mi decidis forlasi la F-ŝtatanecon, tuj kiam Chirac decidis restarigi la atombomboprovadojn en Mururoa. Norvegio ne akceptas duoblan civitancon, konsekvensis aŭtomata perdo de la franca. Mi spontane reagis. La TVelsendo eksciis tion kaj mi estis invitita. Tio restas la sola fojo en mia vivo. Kelkajn tagojn poste mi estis elektita kun verduloj ĉe urbestrado.

Tio kondukas al klarigoj kaj difinoj de nacieco kaj civitaneco. Interese. Nacieco/civitaneco: Por Franco ambaŭ egalas. Sed por ruso/slavo malsamas, ĉar nacieco temas pri kultura afero. Laŭ lia edzino, ŝi restis rusa kaj li franca, dum ambaŭ estas norvegaj civitanoj. Etna kultura difino. En Rusa federacio la homoj restas Germanoj laŭ nacieco, de generacio al generacio jam de 200 jaroj.

Ĉu «judo» indikas naciecon aŭ religion? Dependas de la landoj. Tio konsciigas nin, ke foje necesas klarigi diversajn vidpunktojn por bone interkompreniĝi. Esperanto ne kapablas solvi ĉiujn problemojn pri komunikado.

### **Vivo en Norvegio**

EG: Familie - Kiun lingvon vi parolas familie?

CR: Esperanton kun edzino; france kun filino, la patrino parolas ruse kun ŝi. Ŝi eklernis la norvegan en infanĝardeno kaj la anglan en liceo. Ŝia amiko estas lapono kaj ŝi ne komprenas lian hejmlingvon.

EG: Okaze de disputo?

CR: Esperanto havas multajn eblojn.

EG: Ĉu por konfliktoj ne helpas plurlingveco?

CR: Ne devige, ĉar foje malsama valoro de la vorto. Ekzemple franca esprimo: petit chou/brasiket', kiel karesvorto? Kaj Japano komprenas la vorton tablo kun maltaj piedoj.

EG: Kiukadre vi vojaĝas? Kiam vi relaboros?

CR: Mi profitas sabatan jaron sensalajran, de la 1a de aŭgusto 2019 ĝis la 1a de aŭgusto 2020. Mi relaboros, kiam mi ne plu havos monon.

EG: Ĉu vi estis ofte kontrolita?

CR: Nur ĉe la dogano. En Francio la leĝo asertas, ke mi devas prezenti legitimilon. En Norvegio ne. Eblas libere vagi sen papero.

EG: Profesie: Vi instruas en Norvegio, ĉu estis facile fariĝi instruisto en Norvegio por nenorvego?

CR: Jes, ĉar mi jam estis instruisto en Francio. Post unu jaro mi sufiĉe flue komprenis kaj parolis la norvegan lingvon. Kaj nun anekdoto iom amuza: en la komenco mi rajtis instrui la norvegan lingvon en bazlernejo sed neniu papero atestis mian kompetenton por instrui la francan. La papero atestis en la franca mian kapablon pedagogian sed ne pri la franca lingvo. Mankis la diplomo, kiu montras mian franclingvan kapablon. Mi do devis trapasi tieajn ekzamenojn ...





EG: Ĉu estas gravaj diferencoj en la pedagogio?

CR: Jes. Ĉefe inter kolegoj. Ciumado inter ĉiuj. Respekto ambaŭflanka. La rilatoj estas tre bonaj eĉ kun neinteresataj infanoj.

EG: Kiom da lernantoj?

CR: Deksep en teknika linceo / trideko en liceo.

EG: Programo de historikurso?

CR: Historio de Norvegio kaj de Eŭropo de romia tempo ĝis nun. La programoj konscias, ke Vikingoj estas komenca parto de la historio. La postlasitaj skribaĵoj venas de la viktimoj de la vikingoj, kiuj mem ne scipovis skribi.

## 2- Pri Norvegio: historio kaj socio



CR: Nord-norvegoj taksas sin ekster Eŭropo. Eŭropo estas sude de Skandinavio. Se Britio disiĝas, eble Norvegio aliĝos al EU. Sed jam du referendumoj rifuzis. 52% kontraŭ en 1992. En 1994 Finnlando volis, Svedio hezitis sed jesis, tiam Norvegaj politikistoj volis kaj prezentis riskon resti ekster tamen popolo kontraŭis la prognozojn. Nun la ĝenerala etoso malfavoras.

Elvezio aludas la saman pri Svisio. Paralela ekzemplo.

CR: En 1994 mi voĉdonus kontraŭ aliĝo al EU, sed volonte mi favorus alian soci-alternativon proponitan sed nenio estis starigita de tiam. Mi bedaŭras. Sed neniujn konfliktojn kaŭzas tiuj malakordaj ideoj en Norvegio, ĉar oni ne plu parolas pri EU. EU estas la unua partnero ekonomia, do Norvegio devas sekvi ties regulojn. Ĝi eĉ pli bone sekvas ilin ol iuj ŝtatoj en EU. Norvego facile sin turnas pli al Usono kaj Britio.

EG: Kaj pri la klimato tiel norde?

CR: Ĝi ne estas tro malbona: multe da insuloj kaj Golfo Fluo mildige influas.

EG: Kiu politiko rilate enmigrintojn?

CR: Rilate eŭropanojn sen problemoj; plej multnombraj hodiaŭ estas poloj, dum ili malestis antaŭ 2004, kiam Pollando eniris EU-n. Krome, multaj rusinoj edziniĝis kun norvegoj (por dommastrado); en sia kulturo mia edzino diras, ke kuirejo estas ŝia loko, ne mia.



Rakonto de Bernardo: En Norvegio en 1990 ni estis tre surprizitaj pro unu nigrulo parolanta la norvegan. Ni ne supozis renkonti tiajn enmigrintojn, ĉar Norvegio ne koloniis en Afriko.

CR: Ne surpriziĝu. Ili parolas sian lingvon en la familio. Pli surprizas min, kiam mi vojaĝas en Francio, nigruloj, kiuj parolas francan lingvon al siaj infanoj.

EG: Pri la socia vivo, ĉu reagoj pri Franca situacio en Norvegio?

CR: Ne reagoj ĉar ne informoj prie. Multaj kolegoj nenion scias pri Francio. Tiuj, kiuj interesiĝas, estas ŝokitaj pri la multaj strikoj. La reformo de la pensionoj en Norvegio okazis sen grumblo. Ili komprenis la situacion. Pli longa vivo necesigas kotizi ĝis 67 jaroj. Malpli da junuloj. Kompromiso de la skandinavo. Tre malmultas la strikoj. La procento de sindikatitaj norvegaj laboristoj estas forta. Diferenco kun Franco, kie sindikatoj reprezentas nur 5% de la salajritoj. Nepras aŭskulti ilin. Sed estas ideo ne subpremi la aliajn.

EG: La virina kondiĉo en Norvegio?

CR: Jam multe progresis la virina egaleco. Ekzemplo: la patro post nasko povas ferii 15 semajnojn, ferio netransdonebla al la patrino. Se li ne uzas tiun rajton, la libertempo estas perdita. Tamen pli multaj virinoj ĉesas la laboron por eduki siajn infanojn. Pri salajroj: sur papero egaleco. En kazo de respondecaj postenoj, se egalas kandidatoj, virino estu dungata. Male por la flegista posteno aŭ edukista en infanĝardeno.

EG: Ĉu vi povas paroli pri la reĝo?

CR: La reĝo kaj lia familio estas tre popularaj, ĉar ili estas bonkoraj. La popolo ĝenerale ilin subtenas sed ne pro reĝemo. La reĝo estas nur reprezentanto de la popolo eksterlande kun malpli da povo ol ambasadoro. Li iom kristanece paroladas: ni bone konduitu! Amu la najbaron. Respektinda, respektita dinastio. La popolo sentis tristecon pro forpaso de la reĝo.

EG: Ĉu estas nobeluloj?

CR: Ne, ili malaperis kun la nigra pesto en la 14a jarcento. Ne plu estas aristokratoj.

EG: Ĉu vi povas paroli pri la lingvo?

CR: Estas du oficialaj skribaj lingvoj. Unu, el la dana bokmål, tre proksimas la danan: ĝi estas la lingvo de la libroj. La dua estis artefarita en la 19a jarcento. Ĝin konsistigas kolekto el kamparanaj dialektoj: nynorsk.

La moderna islanda lingvo estas pli malpli la norvega mezepoka. Sed neniu hodiaŭa norvego povas kompreni ĝin. Male komunikado dano-norvego eblas, eĉ se dum konversacio ĉiu parolas sian propran lingvon.

Ambaŭ bokmål kaj nynorsk estas oficialaj. La konstitucio estas verkita en ambaŭ lingvoj. En 1814 ĝi estis en la dana lingvo. Kaj ĝi estis reverkita en moderna lingvo okaze de sia ducentjariĝo en 2014.

La lingvo evoluas: ekzemple por nomi la laponojn oni hodiaŭ uzas pli ofte la vorton Same el la originala lapona lingvo anstataŭ Lape. Tamen la lapona ne ĉie estas oficiala lingvo. Ne en la tuta lando. Dependas de la distrikto.



Reĝo Harald 5a kaj reĝino Sofia

EG: En kiu lingvo vi unue pensis?

CR: En Esperanto. Tio helpis por eki pensi en la norvega.

Marie klarigas, ke ŝi komencis hieraŭ kaj ke necesas strebi pensi en la lingvo streĉante fortan volon per intelekta mekanismo.

\*\*\* Kaj posttagmeze \*\*\*

EG: Ĉu Esperanto viglas en Norvegio?

CR: En Narvik nombrebis 4 kursoj kun 95 lernantoj... en 1938! Nun ne plu. Maljuniĝis la membroj. La Norvega E-ligo enkalkulas 130 membrojn ĉi-jare, kiuj ne sukcesas interesigi gejunulojn. Eble ĉi-lastaj perrete lernas sed ne en kluboj. Kluboj ekzistas en Oslo, Stavenger, Tromso (kun 2 familioj e-parolantaj). Ne plu en Bergen, kvankam en 1991 okazis UK en Bergen. Nun pro ne plu sufiĉaj fortoj, malviglas la movado.

### 3- Norvegio, ĉu virta lando?

EG: Ĉu la ekologia movado estas pli forta?

CR: Tio estas mito. Vorte eble sed ne age. La lando estas vasta do proponas multe da spaco por 5 milionoj da enloĝantoj. Krome ĝin favorigas naturriĉaĵoj. Ekzemple 100%an elektron produktas akvofaloj.

Ekde 1969 ĝi produktas nafton. Tio iĝis tikla por Norvegoj. Sed rapide ili konvinkiĝis ke poluas tiuj, kiuj uzas nian nafton. La Verdula partio ekzistas nur de 30 jaroj. Kaj ĝi estas la sola partio, kiu postulas forlasi nafton, ĉar la enspezoj pro naftovendado kolektiĝas en fonduso, kiu kapitalisme amasas 1000 miliardojn da eŭroj por la pensionoj de estontaj pensiuloj. Tiu fonduso investadas en multegaj diversaj mوندentreprenejoj.


Ventoturbinaj aroj naskis projekton tuj kontraŭitan de parto de la loĝantoj, pretekstanta bruon, malbelecon, danĝeron por la birdoj, ktp.

Ekovendejoj kiaj *Biocoop* ne ekzistas en Norvegio. Nur kelkajn produktojn oni trovas. Ekomanĝo ne estas zorgo de Norvegio. Plastaj sakoj restas disponeblaj en vendejoj.



Kunveturado ne ekzistas. Petveturi ne ekzistas. Bicikloj plinombrigaŝ... ekde la disponebleco de elektraj bicikloj. Mi mem havas najlitajn pneŭojn sur propra biciklo uzata dum tuta jaro kaj ne posedas aŭton. Mi havas malbonan konsciencan rilate ĝardenzorgadon. Mi ne estas perfekta. Mi ne produktas miajn legomojn. Mi kolektas sovaĝajn berojn kaj fungojn sur montoj.

160a Zamenhoftago okazos la 15an de decembro en St-Germain-du-Puch, ĉar mankas libera salono en Galgono. Gerardo GAJAC, la meblisto kaj lia edzino Marie-José afable akceptos nin en la meblofabriko Rusticam [<http://rusticam.com>]. Ni memoras, ke dank'al Gérard ni havis budon en la Internacia bordoza foiro.



Marcelo parolas pri artikolo, kiun li verkas por la *Sennacieca Revuo* pri «liberesprimo per presdesegnoj». Li nun serĉadas la unuan karikaturon de Zaza tra la disponebla gazetaro. Li proponas, ke post apero, ĝi estu nova broŝureto, kiu kompletigos nian grupkolekton. Li raportas pri la interesaj kontaktoj kun Robin Guinin (ilustristo i.a. de la kalendaretoj kaj de la afiŝoj de EDE).

Pourquoi Marie, fille de Karima, apprend-elle l'espéranto ? C'est une langue en plus. Une culture à découvrir. Marie aime voyager – et l'espéranto paraît plus sécure : une bonne solution. Son but : faire un cursus universitaire hors frontières, hors Erasmus. Elle aimerait pouvoir choisir le pays où elle veut étudier. Elle envisage d'adhérer à Citoyens du monde sans renier la France. Conseil de Claude : éviter les villes trop touristiques.

Kelkaj informoj:

- Espéranto-France sendis senpage 250 kalendaretojn sed Susanna demandis, ĉu ni povas sendi monkompenson. Martine devas vidi kun Monique, kiom ni donis la antaŭajn jarojn.
- Prelego de Claude en la Universitato: Mardon je la 17:30 Salono D009. Sekvos komuna vespermanĝo en la domo de la studentoj ĝis la 21:00. Kvar-kvin gestudentoj sekvas la kursojn ĉi-jare. Du promesis veni. Martine kaj Joël bedaŭras, ke ili ne povos ĉeesti.
- Venonta UK en Montrealo, ĉu iu intencas iri? La pesakanoj pretas. Bernardo kaj Rose hezitas pro la kostoj.
- Franjo ĵus sendis mesaĝon, kiu anoncas: Karavano por Bjalistoko kaj Semajnfino en majo en Roŝelo.

*Marcelo kaj Klodin'*

**ZAMENHOF-TAGO**  
**DIMANĈON, la 15an de DECEMBRO**  
**je la 10a 30**  
**ĉe GÉRARD GAJAC**  
**en SAINT-GERMAIN-DU-PUCH**

**M**ultegaj homoj (ĉirkaŭ trideko da) partoprenis en tiu bela Zamenhof-tago, kun tre riĉa programo. Ili venis el la grupoj de Cenon, Créon, Montendre, Galgon ktp.

Dum la mateno, estis proponitaj diversaj ludoj, skeĉoj, rakontetoj, blagoj. Marcelo prezentis humuran prelegeton de profesoro Ŝvarc pri la fundamentaj elementoj de Esperanto (vd p.15). Morine kantigis al ni plurajn kanzonojn, kiujn ŝi uzas en siaj kursoj por infanoj.



Blagojn prezentas Gerardo, Eric, Karine, Joël, Jean-Claude



Rakonteto far Klodin' kaj Martine



Jean-Seb rakontas... kaj ankaŭ Bernardo





Kunkanto, sub la gvidado de Morine



Aliaj komunaj kantoj

Post la manĝo, Gerardo vizitigis al ni sian meblistatelieron, kaj poste gvidis nin en promeno tra la vilaĝo.



Ni zorge aŭskultas la klarigojn de Gerardo pri sia metio.

Promenado tra Saint-Germain-du-Puch



Ni pasigis tre agrablan Zamenhof-tagon, en vigla kaj amika etoso!

*Janine*

## Prelego pri fundamentaj elementoj de Esperanto.

Rajmondo Ŝvarc



Marcelo prezentas  
la ŝvarcan prelegon

«Gesinjoroj! Iun aŭ alian tagon ĉiu el vi fariĝos akademiano. Tiam ne estos senutile koni la plej kaŝitajn sekretojn de nia lingvo.

Kaj tial ni decidis malkaŝi antaŭ vi tiujn mirindaĵojn. Bonvolu nin sekvi!

Kompreneble ni komencos per la komenco, tio estas: per la **alfabeto**.

Gesinjoroj, la esperanta alfabeto estas stranga fenomeno. La plej sagacaj sciencistoj ne scias ekzakte, al kiu fako la alfabeto apartenas.

Multaj kalkulas ĝin inter la legomoj.

Ili pretendas, ke ĝi estas el la familio de la betoj, kiel, cetere, ĝia nomo atestas: **alfa beto**.

Aŭ ili pedante ĝin subordigas al malgranda fabo, tio estas: **al fabeto**.

Ni, kontraŭe, asertas, ke la alfabeto ne apartenas al la **legomoj**, sed al la homoj, kiuj legas. Ĝi apartenas al la **leg-homoj**.

Ĉu vi kaptis la nuancon?

Lastatempe oni renkontas ankaŭ modernajn filologojn, kiuj klasifikas la alfabeton inter la **meblaro**. Laŭ ili, la alfabeto estas meblo, ĉar ĝi estas lito konsistanta el 28 **lit-eroj**. Ĝi estas tuta meblaro, ĉar, efektive, per simpla kunmeto de diversaj literoj oni konstruas plej diversajn meblojn. Ekzemple: **k** plus **m** plus **d** egalas komodo; **s** plus **f** egalas sofo, kaj tiel plu. Tiu klasifiko ŝajnas akceptebla.

El la dirtitaj 28 literoj oni iom post iom kunmetis vortojn, formis frazojn, produktis librojn. Estas preskaŭ nekredeble, kiom da volumoj oni sukcesis plenigi per tiuj kelkaj literoj. Se oni metus unu sur la alian ĉiujn librojn ĝis nun verkitajn, oni havus turon miloble pli altan ol la Eiffel-turo kaj nur iom malpli altan ol la Babela.

Kaj tiu turo, konsistanta el nur malmultaj literoj, fakte ekzistas. Oni nomas ĝin la **Litera Turo!**

Elĉerpinte tiel ĝisfunde la sekretojn de la alfabeto, ni nun parolos pri la proksima paragrafo: la **artikolo**.

Estus insulto klarigi al vi, kio estas artikolo. Artikolo troviĝas en ĉiuj gazetoj. La plej mallongaj ĝenerale estas la plej bonaj.



Tiurilate ankaŭ, ni rememorigu saĝan konsilon de nia Fundamento, kiu bedaŭrinde ne estas sufiĉe atentata: «La personoj, por kiuj la fuŝado de artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la unua tempo tute ĝin ne fuŝi.» Fundamento paragrafo unua.

Kaj nun, gesinjoroj, antaŭ ol fini, ankoraŭ kelkajn vortojn pri la **kazoj**:

La kazoj estas la **formoj** de la deklinacio. Sed ne konkludu, ke kazo estas sinonimo de formo. Neniam diru: «Tiu fraŭlino havas agrablajn kazojn.»

Ĉar, kiam vi interesiĝas pri la formoj de fraŭlino, tio koncernas ne la kazon, sed la kason!

Ĉu vi kaptis la nuancon?

En Esperanto ekzistas nur du kazoj: nominativo kaj akuzativo. Erare kelkaj soifuloj aldonas la **aperitivon**. La aperitivo ne estas kazo, sed nur okazo, jes, okazo por trinki.

Kaj tiun ĉi okazon, gesinjoroj, mi volonte profitos... »



**A**ntaŭ nelonge en la leteraro de la legantoj de la ĵurnalo *La Vie* estis publikigita letero de Joël.

## À propos de Babel !

Dans l'interview qui lui est consacrée (*La Vie* n° 3873), Jean Sellier, géographe et historien, nous parle des langues en ces termes : « *Lexistence d'un parler véhiculaire international me paraît indispensable surtout à notre époque. L'histoire moderne a attribué ce rôle à l'anglais, la cause est aujourd'hui entendue.* » Cette soumission à l'air du temps, au-delà du fait que la domination de l'anglais irrite de plus en plus de monde, ne serait pas du goût du linguiste Claude Hagège. Dans son livre *Contre la pensée unique*, il montre comment la langue anglaise s'est peu à peu imposée sur la planète entière au cours du XX<sup>e</sup> siècle, développant une seule façon de penser. Hagège conclut : « *La France doit entrer en résistance.* » Mais la nécessité d'une vraie langue internationale reste bien sûr indiscutable. Il est souhaitable qu'elle soit une seconde langue pour tous les peuples, qu'elle soit équitable en permettant une communication symétrique, qu'elle soit performante tout en étant suffisamment facile à apprendre. Cette langue universelle fonctionne depuis longtemps et elle a largement fait ses preuves. C'est l'espéranto.

 **Joël Lajus, Sablons (33)**  
lajus.joel@wanadoo.fr



## ACTIVITÉS DE L'ASSOCIATION ESPÉRANTO CRÉON DEPUIS SA CRÉATION EN JUIN 2018



En tant qu'Association Créonnaise, nous avons eu la possibilité d'avoir un stand au Forum des Associations le samedi 8 septembre 2018.

Ce qui nous a permis de faire connaître aux Créonnais l'existence de l'association et surtout de l'espéranto, qui pour de nombreuses personnes était une langue totalement inconnue. Télé Canal Créonnais, présente pour l'événement, a interviewé Morine

STRIDE, la présidente de l'association.



### INTERVENTION AUX T.A.P. (TEMPS D'ACTIVITÉS PERISCOLAIRES) à l'école élémentaire de Créon - année scolaire 2018-2019



Nous voyons ici les enfants composer des phrases.

Les élus locaux, favorables à notre initiative, ont encouragé notre souhait d'intervenir lors des T.A.P. (Temps d'Activités Périscolaires) à la rentrée scolaire. Notre association a été retenue sur présentation de dossier et enregistrée à la DRJSCS.

Chaque lundi de 15h20 à 16h50, un groupe de 8 à 10 enfants de CE2, CM1 ou CM2 participent à une initiation à l'espéranto. La durée d'un groupe est d'environ 6 à 7 séances et change après chaque vacance scolaire. Les enfants ne choisissent pas leur activité, elle leur est imposée par les responsables.

## OPERATION « 10 jours pour voir autrement » avec un concours entre les écoles du Créonnais



Ici de gauche à droite, Hélène l'élue locale, Jean- Claude trésorier et Sylvie secrétaire de l'association, et un enfant qui participait avec beaucoup d'enthousiasme à l'opération « 10 jours pour voir autrement » organisée par l'équipe périscolaire de la Communauté des Communes. Cette opération, du 15 au 24 mai, consistait à proposer aux enfants des écoles des communes environnantes de relever le défi de passer 10


jours sans écran. En contrepartie, les enfants avaient accès aux activités proposées par les associations du secteur. Ce qui nous a permis de faire connaître l'association Espéranto-Créon.


Les cours pour adultes ont débuté le 7 janvier 2019. Sept personnes se sont inscrites depuis le début des cours qui ont lieu le lundi de 18h30 à 20h.

Le site "[esperanto-creon.fr](http://esperanto-creon.fr)" est opérationnel depuis septembre 2018.

Toute l'équipe, Sylvie, Jean-Claude, Pejo, Vincent et moi-même, nous sommes à l'écoute pour bénéficier de votre expérience.

*Morine*





## Enkonduka noto

**E**n 2021 Oĉjo Georges estos honorata pro la centa datreveno de sia naskiĝo kaj kvardeka de sia morto. En Cenon, urbo apud Bordoza, kie troviĝas de kvindek jaroj la sidejo de nia loka Esperanto-asocio, ni ekpreparas la eventon. Kaj tial petas jam vian eventualan kontribuon. Ĉu vi pretas kunhelpi al sukceso de tiu festo?

Oĉjo Georges verkis pli ol ducent kanzonojn. El tiuj almenaŭ 29 jam estis tradukitaj en Esperanto. Kelkaj en pluraj versioj. Vi trovos ĉi-kune la liston.

Mi ekkolektis tradukojn de Brassens-kanzonoj preparante la unuan spektaklon de La Kompanoj, kanto kaj teatra trupo de Espéranto-Gironde, por la spektaklo *Promenado tra la lando de Oĉjo Georges* prezentita en la SAT-Amikara kongreso en Ambūazo en 1991. Ĝi iĝis *Vizito ĉe Oĉjo Georges* en 1994 por prezentado en la Marteatro de Seto, okaze de UFE-kongreso.

La kolekto ampleksiĝis sub impulso de Ĵak Yvart, kiu registris la KD-ojn *Yvart kantas Brassens* en 2000 kaj *Brassens plu* en 2010.

Venas do tempo grupigi novajn tradukojn. Ĉu vi konsentus partopreni en tiu tradukokampanjo? Prefere ne traduku jam tradukitan kanzonon; kontrolu do antaŭ ol ekversi, ĉu via elekto ne jam kuŝas en la ĉi suba listo.

Se vi bezonus tekston aŭ partituron, ne hezitu peti de mi.

Defio 2021: Eldoni libron kun almenaŭ kvindek diversajn kanzonojn de Oĉjo Georges en Esperanto!

\* Ĉu vi konas jam tradukitajn kanzonojn ne listigitajn ĉi tie?

\* Ĉu vi konsentus perfektigi malneton de tute nove preparita traduko el la ĉi posta listo?

\* Ĉu vi pretas prepari novan tradukon?

\* Ĉu vi eventuale konas esperantist(in)on, kiu pretas kunlabori en tiu afero?

Ne hezitu publikigi tiun alvokon, aŭ ĝin plusendi al viaj kutimaj rondoj.

Amuzikajn antaŭdankojn,

Marcelo Redulez

marcel.redoulez@wanadoo.fr

## 2019-12-07 - Kolekto de la kanzonoj de Brassens tradukitaj en Esperanto

originala titolo	E-titolo	tradukintoj	registritaj de
Auprès de mon arbre	Apud mia arbo	Bernard Legeay	
Auprès de mon arbre	Ĉe mia arbo	Marcel Ternant	
Chanson pour l'Auvergnat	Kanto por la Kampul'	Roger Bernard	Olivier Tzaut Jakvo Yvart
Dans l'eau de la claire fontaine	En akvo de la klara fonto	Marcel Ternant - Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
Don Juan	Donjuan'	Marcelo Redulez	
Il n'y a pas d'amour heureux	Ne kredu pri feliĉa am'	Michel Duc Goninaz	
Je me suis fais tout petit	Pupinet'	Janine Dumoulin Marcelo Redulez	
Jehan l'advenu	Johano, la neavertinto	Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
L'orage	la ŝtormo	Bernard Legeay	
La ballade des gens qui sont nés quelquepart	Balado de la ienaskita ular'	Bernard Legeay	
La ballade des gens qui sont nés quelquepart	La Balado de homoj fieraj pro sia deveno	Vito Markov	
La chasse aux papillons	La kaptado de papili'	Roger Bernard	Jakvo Yvart
La file indienne	La longa vico	Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
La guerre	La milito	Rikardo Cash	Jakvo Yvart
La marguerite	La lekanto	Pjer Buvje	
La marine	La marista amo	Roel Haveman	Jakvo Yvart
La mauvaise herbe	Herbaĉo	Marcel Ternant	
La mauvaise réputation	La malbona renomo	Marcel Ternant	
La mauvaise réputation	La misfamo	Vito Markov	
La princesse et le croquenotes	La princino kaj la notovorulo	Johano-Luko Berjon'	
Le gorille	La gorilo	Marcel Ternant	
Le grand chêne	Granda kverk'	Bernard Legeay	
Le parapluie	La pluvombrelo	Bernard Legeay - Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
Le petit cheval	La ĉevaleto	Roel Haveman	Jakvo Yvart
Le roi boiteux	la lamanta reĝo	Marcelo Redulez - Bernard Legeay	Jakvo Yvart
Le roi boiteux	La lama reĝo	Roel Haveman	
Le vieux Léon	Oĉjo Leon	Michel Duc Goninaz - Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
Le vin	La vino	Luc Gouverneur - Marcelo Redulez	
Les amoureux sur les bancs publics	La geamantoj sur la verda benk'	Claude Piron - Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
Les copains d'abord	Tuj la Kompanar'	Bernard Legeay - Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
Mourir pour des idées	Mortadi pro ide'	Georgo Lagranj'	Ĵak Le Pûil
Pauvre Martin	Povra Marteno	Marcelo Redulez	Jakvo Yvart
Si seulement elle était jolie	Se almenaŭ beletus ŝi	Bernard Legeay	

## Listo de la kanzonoj kun malneto de tradukoj plibonigendaj:

originala titolo	E-titolo	tradukintoj
Bonhomme	Bonulo	Marcelo Redulez
A l'ombre du coeur de ma mie	En ombro de l' amatinkor'	Marcelo Redulez
Les trompettes de la renommée	Trumpetoj por la famo	Marcelo Redulez
Marquise	Dukino	Marcelo Redulez
Je rejoindrai ma belle	Al mia belulino	Marcelo Redulez
La non-demande en mariage	La geedziĝa nepeto	Marcelo Redulez
Fernande	Paloma	Marcelo Redulez
<i>Les passantes</i>	<i>La pasantinoj</i>	<i>Marcelo Redulez</i>
La messe au pendu	La meso al la pendumito	Marcelo Redulez

## NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le vendredi de 10h à midi, cours pour débutants, au local attenant au bureau de poste de la Hume, salle de formation, 43 avenue du Maréchal de Lattre de Tassigny 33470 Gujan-Mestras. (06 95 02 85 00)
- A **CREON**, le lundi 15h30 à 16h45 (TAP) et de 18h30 à 20h (pour adultes), Morine STRIDE (06 10 07 08 58)
- En **GALGON**, ĉiun duan vendredon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)
- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon. (05 56 21 38 64)
- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine DUMOULIN gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 07 46)
- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono D-009, ĉiun mardon de la 17a 30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio helpe de Jean-Seb. (06 72 17 22 97)

# ESPERANTO-GIRONDE

## KUNVENO en CENON PALMER

### la 12an de JANUARO 2020

### je la 10a 30

**C**eestas: Annie Brilleaud, Jean-Seb Brilleaud, Elvezio Canonica, Karima Choukairi, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Martine Edelbloude, H el ene Forget, Gloria Gargallo, Jo el Lajus, Klodin' Pomirolo, Marcelo Redoulez.

**Senkulpigataj:** Christiane kaj Michel Jagueneau, Peio Labb e, Lucienne Laroche, Bernardo kaj Rose Sarlandie, Morine Stride, Bernard Vidal.


**Elvezio** salutas  iujn kaj deziras al  iuj feli an jaron.

Li tuj petas de Jean-Seb prezenti prelegon pri **manskribo de dro Zamenhof**.

#### 1/ Prelego de Jean-Seb

Foliumante binditan kolekton de la revuo *Tra la mondo* de 1905, kiu ku is en la arkivo en la  rankoj de Esp eranto-Gironde, Jean-Seb trovis manskribitan dokumenton en la franca de iu, ver ajne tiama leganto, a  e  posedanto de la kolekto. La enhavo de tiu dokumento estas grafologia analizo de la manskribo de Zamenhof, la  foto de mesa o publikigita en iu numero de tiu revuo.

La revuo *Tra la mondo* estis publikigita inter 1905 kaj 1908.  i temis pri  eneralaj informoj. La  efredaktoro estis Auguste Montrosier, ka nomo de kapitano Auguste Cap e, kiu disvolvis Esperanton en Al erio. Tiu revuo estis inter la plej presti aj en tiu epoko.



La mesa o de Zamenhof estas en la 2a numero, post la kongreso de Bulonjo.

Marcelo precizigas, ke tiu fonduso originas de la unua Esperanto-grupo de Bordoza, kiu fondi is en 1902. La kasisto de la grupo estis Charles-Jean Brunet, anka  en la redakto-skipo de la revuo, en kiu li publikigis ludojn, enigmetojn...; li ludis sufi e gravan rolon en la

tiama movado: oni povas vidi lin apud Zamenhof sur fotoj de la kongreso. Li gastigis al Lidia Zamenhof, kiam  i vizitis Bordozon.

Se la analizo pravas, jen la  efaj trajtoj de Zamenhof:

- intelligence, sensibilit e, cr ativit e
- manque de charisme
- plus m diateur que leader

Se oni akceptas tiun analizon, oni povas fari plurajn demandojn:

- Kiu estis la rolo de la «pioniroj»?
- Kiu estis la rolo de Hodler (organizinto de la 2a Universala Kongreso), Privat, Sebert, Michaux (kiu organizis la unuan)?
- Kiel taksi la rolon de de Beaufront (Louis Chevreux), kiu grave agis dum la «franca periodo», kontraŭis la reformojn ĝis 1908, estis kromnomita «la dua patro de Esperanto», kaj finfine elektis Ido-n.

Influence de Zamenhof sur le mouvement :

- pas d'autoritarisme
- actions créatives mais peu coordonnées
- légende et histoire du mouvement
- Zamenhof leader mythique
- le mouvement a plutôt dépendu d'espérantistes influents comme de Beaufront, Lanti, Lapenna...

Jean-Seb suggère d'exploiter notre fonds d'archives, très riche, pour explorer des thèmes comme :

- la période française du mouvement (qui a valu à Zamenhof d'obtenir la Légion d'honneur)
- l'histoire de l'Espéranto en Gironde au début du 20<sup>ème</sup> siècle

On pourrait constituer un groupe de personnes intéressées, qui proposeraient des notes de lectures pouvant alimenter le site internet.

## **2/ Centjariĝo de Germaine Gatard**

Marcelo: Germaine Gatard, membro de Esperanto-Gironde, estos centjara la 27an de januaro. Ŝin kaj alian centjaran lormontaninon honoros la urbestro de Lormont, okaze de la bondeziroj al la loĝantaro, merkredon la 22an de januaro. Marcelo, Klodin', Monique, Martine interalie, ĉeestos. Germaine estas membro de Esperanto-Gironde de tridek jaroj. Ŝi kunanimis la butikon de la kongreso de 1992, aktorin por la festo honore al Leo en 1998.

Klodin' subskribigas karteton al ĉiuj el ni. Ni pripensas pri donaco por kunporti: ĉu florbukedon, Brel-KD-on?

Klodin' informas pri la sanstato de Michel Lavergne. Li transloĝiĝis en maljunulejon apud Tours, sed ne konscias pri sia situacio.

## **3/ Pri la akceptado de Claude Rouget**

Klodin': Espéranto-Gironde ne elspesis monon. Nur necesos repagi al Yves Nicolas la kostojn dividitajn inter la akceptintaj grupoj. Yves Nicolas petis raporteton pri la restado de Claude en Bordojo. Elvezio ĝin verkos kaj sendos (aŭ povos taŭgi la raporto de Marcelo kaj Klodin').

Ni retsendu la venontan LEGI al Claude.

### 3/ Pri Don Kihoto

Marcelo: *Sennaciulo* aperigis raporton pri la barcelona kongreso de 2019, kaj la tradukon de la novelo de Jean de la Ville de Mirmont *La morto de Sanĉo*.

Ĉar la tekstoj estis tradukitaj de «la cenona kvinopo», Marcelo ricevis kvin ekzemplerojn de la lasta numero de la revuo por disdoni al la anoj de la kvinopo.

### 4/ Projekto Brassens 2021

Marcelo: La jaro 2021 estos duobla datreveno pri Brassens: centjariĝo de lia naskiĝo kaj kvardekjariĝo de lia forpaso.

Blaise Guinin favoras ilustrati la libron, kiun ni eldonos pri la esperantigitaj kanzonoj de Brassens. Nun estas 28 kanzonoj tradukitaj en «definitiva» stato (ili jam estis kantitaj, eĉ registritaj). Por kelkaj malmultaj kanzonoj, ekzistas du aŭ tri versioj.

Marcelo sendis mesaĝon al tiuj, kiuj partoprenis en la projekto *Brassens plu*, de 2007, kaj en tiu de Lille 2015. Multaj respondis. Silĉjo Barrier sendis dek tradukojn jam faritajn de pluraj jaroj por kontroli kaj poluri. Nun ni havas 51 malsamajn kanzonojn (t.e. 1/5 de la tuta kanzonaro de Brassens).

Bernard Legeay apogas la projekton.

La nepra afero estas, ke la tekstoj estu:

- kanteblaj
- lingve seneraraj

En la tradukrondo partoprenas tri nefranclingvanoj.

Agenda :

1<sup>er</sup> semestre 2020 : travail sur les textes

2<sup>ème</sup> semestre : choix des textes, élaboration du livre.

Nous discutons pour savoir s'il ne vaudrait pas la peine de joindre les textes originaux, ou les traductions littérales. A réfléchir, sachant que le livre ne devrait pas dans l'idéal comporter plus de 100 à 150 pages.



Fabrice ne participera pas aux tra-


ductions mais se réserve le droit de demander des modifications s'il considère qu'un texte (ou une partie) n'est pas chantable ; il participera aux concerts, voire à l'enregistrement (mais ce dernier point ne concerne pas Espéranto-Gironde).

Marcelo et Martine étudieront le budget du projet. Il faut déterminer si nous voulons un livre le moins cher possible ou simplement rentable.

Discussion sur le prix de vente du livre : entre 12€ et 15 €.

Blaise propose de faire un livre de 22\*22 cm : format original, qui permet d'avoir une chanson complète sur la double page.





On pourra organiser des concerts dans lesquels on vendrait le livre.

Résumé : 2020 : Rédaction du livre (chansons ; préparation physique du livre, mise en pages)

2021 : 1<sup>er</sup> semestre : impression, règlement.

Klodin' : Il faut penser que les livres ne se vendent pas très bien à l'heure actuelle, même si le prix est plus intéressant par grande quantité.

Marcelo : C'est à nous d'établir le prix de vente et la quantité que nous comptons vendre en 2021-2022. Il y aura des concerts organisés par Espéranto-Gironde un peu partout en France et ailleurs. On peut prévoir un stage Brassens vers mi-octobre 2021. On prendra contact avec les Kompanoj du spectacle de Lille (une trentaine). On inclura le prix du livre dans le coût de l'inscription au stage.

Il faudra étudier toutes les possibilités pour l'impression du livre. Annie a suivi un stage d'écriture et peut donner les coordonnées de l'éditeur qui animait le stage. Ne pas hésiter à mettre plusieurs imprimeurs en concurrence.

De tout façon, il faudra passer par une vente par souscription (le prix proposé sera alors le prix de revient du livre). On peut aussi demander la participation de SAT-eldonfako, voire proposer un financement participatif.

Yannick : Est-ce que l'on connaît la différence de coût entre une édition à compte d'auteur et une édition chez SAT ou FEL, par exemple ?

Marcelo : Le coût est de 2000 € pour 500 exemplaires à compte d'auteur (broché, couleurs, 21\*21 cm). Il vaut mieux passer par un imprimeur que quelqu'un connaît déjà.

Je la 13a 20, ni komune tagmanĝas, kaj pluraj reĝoj kaj reĝinoj aperas dum la frandado de la reĝkukoj!



Post promenado tra la parko, ni revenas kaj denove diskutas pri la projekto Brassens.

Marcelo: Kiel ordigi la tekstojn? Ĉu laŭ alfabeto ordo? Se jes, ĉu de la originalo, aŭ de la traduko? Kaj kion fari, se ekzistas pluraj tradukoj de la sama teksto? Ĉu laŭ la temoj? Sed pluraj kanzonoj entenas plurajn temojn, aŭ kelkaj temoj koncernas nur unu kanzonon... La plej trafa ordigmetodo ŝajnas laŭ la eldonjaroj de la originaloj.

Ĉu indus prezenti ĉiujn (aŭ kelkajn) kanzonojn, kun klarigoj pri esprimoj aŭ verko-cirkonstancoj?

Elvezio: Nun en la universitato estas fako pri francaj kanzonoj; povas esti verkoj aŭ tezoj pri Brassens. Alia ideo: Ni povus organizi atelieron pri traduko de unu kanzono en venonta kunveno.

Marcelo: Ekzemple pri *Pupinet'*. Kelkaj estas facile tradukeblaj, ĉar la versoj estas sufiĉe longaj, kaj la Esperantaj esprimmanieroj similas al tiuj de la franca.

Ni devas diskuti pri pluraj detaloj, ekzemple kiom grandaj estu la letertipoj en la libro.

Kiu aĉetus la libron? Esperantistoj, kaj Brassens-kolektantoj. Notinde estas, ke Blaise estas profesiulo: liaj desegnoj estos altkvalitaj. Ni pagos lin por la laboro. Li diris, ke la normala prezo povas esti ĝis 600 € por la frontpaĝo. Marcelo informis lin, ke Espéranto-Gironde povos pagi inter 1500 kaj 2000 €. Li konsentis, kaj pretas fari desegnojn por multaj kanzonoj. Ni povas pagi lin per 1500 € + librojn por vendi. Interese estas, ke la fratoj Guinin malfermas al ni la pordojn de UFE.

Laŭ Blaise, la neordinara formato povas alkroĉi la rigardon.

La libro entenu 100 ĝis 150 paĝojn. Ni scias, ke ne ĉiuj reagis; eble ni atingos sesdekon da tradukoj...

Ĉu en la titolo ni konservu la originalan ortografion de Brassens (kun 2 «s»)? Fakte sur la du KD de Jacques Yvart, Brassens estas skribita kun du «s».


Joël: Ce projet concerne essentiellement le mouvement espérantiste. Est-ce qu'il ne vaudrait pas la peine de faire mieux connaître l'espéranto au public français ?

Klodin': Les deux ne sont pas incompatibles. Lors de manifestations pour l'anniversaire de Brassens, on pourra parler de l'espéranto à travers les traductions de Brassens en espéranto.

Elvezio: Il existe à Pessac une chorale qui chante surtout du Brassens: Les Copains d'accord.

Marcelo: Xavier Redon, guitariste de Kaj tiel plu, est prêt à venir (par exemple pour le stage).

La venonta kunveno okazos la **9an de februaro** ĉe Annie kaj Jean-Seb en Pessac.



Janine

## KIAL LA STRIGOJ ULULAS

*Teksto el la serio Mil jaroj da fabeloj - Naturo; Eldonejo Milan.*

**N**iatempe arbaro estas kvieta loko plena je harmoniaj birdokantoj. Sed iam, vere antaŭlonge, ĝi tute ne estis tiel. Ĉiuj birdoj kantis ion ajn iel ajn. La najtingalo grakadis «kroa... kroa...» riskante raŭkiĝi. La aglo el tuta gorĝo freneze kriadis «ku ku... ku ku...». La pigo pepadis, la korvo sibladis, la kolombo kvitadis kaj la pasero kveradis. Ili bruegis tiel repelante, ke por ne plu aŭdi ilin, la kunikloj, la aproj kaj la cervoj surŝovis dikajn ĉapojn sur siajn orelojn. Sed tio ne sufiĉis.

La urso, kiu mastre regis la arbaron, tre ĉagreniĝis. Des pli, ke ĝi ŝatis siesti, dum tiuj ĥaosaj krioj malhelpis lin trankvile dormeti. Tial, iun tagon, li decidis kunigi ĉiujn birdojn en granda senarbejo. Kaj ili akceptis la inviton. Ĉiuj, krom la strigo, ĉar ĝi vekiĝis nur vespere kaj dumtage dormis.

La urso tiam eldiris:

- Unuvorte. Ĉu vi vidas tiun barelon? Ĝi estas plena je birdokantoj. Sufiĉe por ĉiu el vi. Zorge elektu tiun, kiu apartenos al vi, ĉar vi dumvive konservos ĝin. Vi ne povos ŝanĝi ĝin kaj vi nepre lernigu ĝin al viaj idoj kaj praidoj.

La birdoj tuj impetis al la barelo kaj eltiris la ariojn, unujn post la aliaj. Ja ili iomete kverelis, sed fine akordiĝis kaj ĉiu alprenis la sian.

Kiam la strigo vekiĝis, ĝi ekvidis la barelon malplenan, apud kiu la urso kviete legis sian ĵurnalon, ĉar ĝi ankoraŭ ne dormemis. La strigo demandis:

- Kio do estas tiu ĉi barelo?



La urso klarige respondis kaj la strigo eklekis:

- Ĉu do nenion mi mem povos kanti?

La urso pripensis kaj fine konsilis:

- Vi devus iri al la vilaĝo, kiu situas aliflanke de nia granda arbaro. Laŭdire uloj tie festadas. Ili dancas kaj kantas kanzonetojn. Ili eble lernigos unu al vi.

Al la strigo tre plaĉis la ideo. Ĝi longatempe flugis tra la arbaro...

Kiam ĝi fine atingis la vilaĝon, jam estis sonintaj la notktomezaj dekdu batoj. Ĉion envolvis obskuro. Lumetis nur unu kabano. Interne, la kandletoj preskaŭ forbrulis kaj la kamena fajro baldaŭ konsumiĝis. La uloj estis tiel lacaj pro dancado kaj kantado, ke ili ĉiuj jam endormiĝis.

luj ĵus rulfalis sur la tablono, aliaj sub...

Lulante siajn infanojn sur siaj genuoj, virinoj ekdormetis. La muzikintoj ronkis sur benko... Tamen, en angulo, knabo revante ankoraŭ vagigis sian arĉon sur sia muzikilo. Ĝi estis giganta kontrabaso, duoble pli alta ol li. El ĝi laŭtiĝis stranga sono: « ul' ul' ul' ul' ».

- Nur tiu kanto restas por mi, suspiris la strigo. Ĝi estas ne beleta sed almenaŭ ne malfacila.

La strigo senhezite lernis ĝin kaj reflugis al la arbaro. De post tiam, ĉiunokte, tiuj, kiuj ankoraŭ ne dormis, aŭdis ĝin milde ululi: « ul' ul' ul' ul' »

Poste ĝi instruis tiun rekantaĵon al siaj idoj kaj praidoj. Tial de tiu pratempo, en tiu arbaro kaj ankaŭ ĉie, strigoj kaj gufoj, ĉiuj ululadas: « ul' ul' ul' ul' », «ul' ul' ul' ul' ».

*Tradukita de la Cenona Kvinopo 2019*



C.E.E.A. (Espéranto-Ariège)

Mairie - FR - 09340 VERNIOLE

27-a KORUSO-STAĜO



en Esperanto kun skiado, turismo

& kun folk-muzik-aj inter-ŝanĝoj

de sabato, 15-a ĝis

sabato, 22-a de februaro 2020

en feriejo de La Bastide/Hers (Ariègejo),

en katarisma Nord-Pirenejo

Korusa laboro sub gvido de

bulgara Zdravka BOJĈEVA

ŝi E-e kaj lokalingve korusestradas en diversaj landoj.

Plurvoĉaj kantoj el diversaj tempoj & teritorioj

Laŭkutime pluraj partoprenantoj alportos siajn muzik-instrumentojn por folk-ludadi lateble ankaŭ kun lokaj spertuloj.

Iuj komencantoj en E<sup>o</sup> kaj akompanantoj de korusanoj ricevos E-kurson, ĉu ankaŭ vi ?

**Programo** : ĉiutage 5 horoj da kantado, kultur-/turism-aj vizitoj, ekskursoj & vesperaj ludoj, debatoj, spektakloj, ktp.

**Akcepto** : ekde sab., 15-an de feb. je la 15-a horo.

**Staĝ-eko** : dim., 16-an de feb. precize je la 9-a h.

**Staĝ-fino** : sab., 22-an de februaro je la 15-a horo.

**Aliĝo-kondiĉoj** : CEEA-aniĝo (pro asocia assekuro) : normale: 16 €, rabatite: 11 €, patro: 24 €, infanoj: 5 €

**Enskribiĝo por la semajno** : malplilkoste se pli frue, pli junaĝe aŭ plurope el sama familio.

Kiun ?	1 ? Kuj ?	Prenkresk.	→ 25-jara aŭ	→ 16-jara aŭ
			2-a pensono	aŭ 3-a pens.
→ 31-a de okt.	75 €	75 €	90 €	45 €
→ 15-a de dec.	90 €	90 €	75 €	60 €
Poste...	105 €	105 €	90 €	75 €

Rimarke : akompanantoj, kiuj restadas sen staĝumi ne pagos enskribiĝon krom infanetoj bezonantaj apartan prizorgadon.

Por ununura tago, kun mango : 30 €

**Restad-kostoj** :

7 x 24 horoj (nokto + 3 mangoj) : 287 €  
Sen Tag-Mangoj : 224 €

Aliaj eblecoj (ekz. Solidarece) : petu apartajn tarifojn.



**ALIĜILO** :

Vok-Nomo : .....

FAMILIA NOMO : .....

Adreso : .....

Tel-N<sup>o</sup> : .....

@dreso : .....

URBO : .....

**Mi alvenos** .....-an de februaro je la ....h..... :

- en La Bastide/H /\_ / ; sag-ŝildoj indikos vojon !

Estas ..... liberaj sid-lokoj en mia aŭto ek de (urbo)

..... kaj mi pretas veturigi iujn alia(j)n

**Mi alvenos trajne en Toulouse/Pamiers** je la .....-a h. .... (sekvu base en Laroque d'Olmes) aŭ en Bram je .....-a h. ....

Mi enskribiĝas, kiel : \*akompananto /\_ /

\*korusano /\_ / basa /\_ / tenora /\_ / alda /\_ /

soprana /\_ / komencanta /\_ / konfirmita /\_ /

Mi leg-kapablas : - Eon /\_ /, se "ne" indikiĝos prononco)

- Muzikon /\_ /, deziras jam ricevi partiturojn /\_ /

\* amatora muzikemulo, ludanta

\* E<sup>o</sup>-komencanto & deziras baz-/progresig-an kurson /\_ /

Ci-kunas mia pago (ekde al CEEA - CCP n<sup>o</sup> 257 934 E Toulouse) pri:

1) Aniĝo ĉe CEEA (deveje) .....

2) Enskribiĝo je l'staĝo .....

3) Restad-kosto ..... €, antaŭpago 10% .....

4) Donaco lativola .....

5) Sumo ..... € ; hodiaŭ pagataj .....

6) Restos por pagi je alveno .....

Okaze de rezigno repageblas nur enskribiĝ-kostoj ĝis de 30-a nov. & restad-kostoj ĝis 15-a de jan.

Ĉian sendaĵon al : **MONIK** Garrigues - Muelejo - FR - 09 600 LIMBRASSAC - Informoj ĉe Jorgos Tel 33/0 468 605 417 ; rete <mailto:tutpekto@aliceadsl.fr>

Pliaj ideoj, proponoj, petoj : ..... (& dors-flanke, dankon !)

# La eskapema kukumo

*Teksto de Oktavo Mirbo' (Octave Mirbeau)  
tradukita de la Cenona Sesopo  
(Martine, Monique, Klodin', André, Marcelo, Gloria)*



**M**i diros al vi, ke mi ŝatas florojn per kvazaŭmonomania pasio. Floroj estas por mi «silentaj kaj ardaĵ» amikoj, kaj fidelaj. Nur ili ĝojigas min. Sed mi ne ŝatas la senspritajn florojn, ĉar, kiel ajn blasfema ŝajnas tio, ja estas senspritaj floroj, aŭ alidirite floroj, kompatindaj floroj, al kiuj hortikulturistoj transsendis sian kontaĝan senspritecon. Ekzemple begonioj, kiujn hodiaŭ en ĝardenoj oni prezentas en tiel suferiga elmontraĵo. Tia-grade ke ĉiu alia floro estas ekzilita, kaj ke la tuta floraro ŝajnas enteni nur tiun stultan planton, kies petaloj ŝajnas ĉizitaj per premtranĉilo el iu misdigestebla nabo. Kruda pulpo, artefarita koloro, rigidaj formoj, sen iu ajn gracio, sen iu ajn fantazio, molaj kaj plumpaj tigoj, sen beleta fleksiĝo sub brizo, neniu parfumo eliĝas el ĝi, kaj ĝia animo similas tiun de pupoj: mi volas diri, ke ĝi ne havas animon, kio apenaŭ kredeblas. En Meksikio, kie ĝi libere kreskas, oni asertas, ke begonio estas ĉarma. Ve! Kial tie for oni ne lasis ĝin?!

Ho! Kiel la hodiaŭaj ĝardenoj malamikas kontraŭ mi! Kaj kia morna enuo ilin tristigas! Kian malnoblan rolon de atendeja tapiŝo, de stala mozaiko, de amaĵistina litkovrilo, ĝardenistoj, mozaik-kulturistoj kaj gazon-septistoj trudis al floroj! Ĉiujn trajtojn de ilia mistera karaktero, ĉiujn kortuŝajn simbolojn kaj delicajn analogiojn, la tutan delikatan arton, kiu disradias el iliaj kalikoj, kiel mirindaj instruaj formoj, oni obstinege deprenas de ili. Oni devigas ilin malaperi, tranĉitaj, stumpigitaj, senhirtigitaj, nivelitaj, per krima

tigotondilo, en mishamonia konfuzo, en kvazaŭ aŭtomata kaj fia plektado. Floroj estas plu tolerataj en ĝardenoj, nur por diri la superan stultecon de ĝardenisto, por ekspone per nombroj kaj nomoj la riĉecon kaj vantecon de la posedanto. Homoj postulas, ke floroj malaltiĝu ĝis ilia snobeco, ĝis ilia vulgareco. Nenio tiel tristigas kiel subjugitaj floroj.



La floroj, kiujn mi ŝatas, estas la floroj de niaj herbejoj, de niaj arbaroj, de niaj montaroj. Mi estas atendonta de Nord-Ameriko la miraklan belecon de tieaj kompozitacoj, la majeston de tieaj heliantoj kaj silfioj. En Japanio mi serĉadas la obscenan naivecon de tieaj lilioj, la senbridan kaj luksan ĝojon de tieaj peonioj, la petolan vervon de tieaj ipomeoj. Oriento alportas al mi la tutan senliman diversecon de tieaj bulboj, la eksterordinaran ĉifaĵon de tieaj papavoj, anemonoj, ranunkoloj. Kaj kion diri pri Svisio, kie el ĉiu roka deklivo eliĝas mirinda, vegetala vivo, kie ŝtoneto gastigas la etan semon, kiu al ĝi sin konfidigas, kie neĝo kovas kaj preparas la ardajn printempajn vesperojn? Kia plezuro - mi iun tagon rakontos tiun plezuron, kaj mi rakontos ankaŭ, kion floroj entenas ne nur rilate revadon, belecon, sed ankaŭ mensan ekscitiĝon kaj belartan edukon, - kia plezuro kunigi en unu ĝardeno ĉiujn tiujn miraklajn estaĵojn kaj al ili doni la grundon de ili ŝatatan, la aeron vigligantan iliajn delikatajn organojn, la ŝirmejon de ili bezonatan, kaj lasi ilin libere elkreski, disflori laŭ sia admirinda bontrovo kaj konforme al sia bonkoreco; ĉar floroj estas bonkoraj kaj donacemaj por tiu, kiu scipovas ilin kaŝoli.

*Daŭrigota*



**ESTRARO**  
**de**  
**«ESPÉRANTO-GIRONDE»**

\* \* \* \* \*

**Centre Culturel Château Palmer**  
**33150 CENON**

\* \* \* \* \*

Prezidanto: **Elvezio CANONICA**  
Université de Bordeaux Montaigne  
UFR Langues,

Domaine Universitaire, Esplanade des Antilles,  
33600 Pessac

Tel: 06 72 17 22 97 / [canonica.elvezio@orange.fr](mailto:canonica.elvezio@orange.fr)

Sekretariino: **Janine DUMOULIN**

2, chemin des Nauves

Chardes 17130 MONTENDRE

Tel: 05 46 49 07 46 / [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)

Kasistino: **Martine EDELBOUDE**

2 rue Raymond Lavigne

33100 BORDEAUX

Tel: 06 73 34 81 88 / [mabel1533@laposte.net](mailto:mabel1533@laposte.net)

\* \* \* \* \*

**Materialon por LEGI bv. sendi al [janinedum@neuf.fr](mailto:janinedum@neuf.fr)  
aŭ al [esperanto.gironde@free.fr](mailto:esperanto.gironde@free.fr)**

